

Eŭropa Bulteno

Decembro 2016, Numero 166

LA PLEJ GRAVAJ ATINGOJ POR ESPERANTO EN 2016



Kvankam ni troviĝas en periodo de grava monda ekonomia kaj politika krizo kiu principe ne konvenas por disvastigado de pripacaj kaj internaciismaj ideoj, ankaŭ en 2016 la E-movado en Eŭropo havis kelkajn esceptajn atingaĵojn, kiuj povus havi tre pozitivajn sekvojn en la posta historio. Al tiuj esceptaj atingaĵoj mi kalkulas la jenajn:

1. Partopreno de unu el la plej alte poziciitaj politikistoj de Eŭropa Unio en Universala Kongreso de Esperanto: dro Vytenis Andriukaitis kaj lia ege pozitiva parolado pri la E-movado, kiun li aperigis en sia blogo ĉe la oficiala paĝaro de Eŭropa Komisiono. Tiel malferman subtenon ĝis nun faris neniu alta politikisto, des malpli iu kiu gvidas la tutan eŭropan sanservon kaj prisanan politikon. Supozeble li plu faros pli konkretajn paŝojn subtene al Esperano en du-tri sekvaj jaroj de sia mandato.
2. Realigo de tre sukcesa eŭropa konferenco „Perspektivoj de lingva politiko en EU“ en Nitro (Slovakio) kiun organizis Nitra Universitato kaj Slovaka E-Asocio sub la aŭspicio de ministro pri eksteraj kaj eŭropaj aferoj kadre de Viŝegradaj landoj, en kiu partoprenis politikistoj, lingvistoj kaj sociaj kaj prihistoriaj sciencistoj. La konferenco akceptis tre gravajn konkludojn, kiujn fine de decembro slovaka ĉefo de la komitato por Prezidenteco

de Slovakio en Eŭropa Konsilio dissendis al siaj egalnivelaj kolegoj en ĉiuj EU-landoj (vidu artikolon de J.Reinvar). Tiu ĉi politika atingo povus esti ankaŭ grava sprono al politika pritrakto de Esperanto en Eŭropaj landoj.

3. Granda evoluo de reta instruado de Esperanto. Sendube la funkciado de Duolingo estas mirinda. Em 2016 la porkomencanta kurso en la angla kreskis al 700.000 lernantoj, sumo neimagebla en la E-movado, ankaŭ gravega kiel reala indiko pri altaj nombroj de Esperanto-uzantoj kaj en aŭtuno ekfunkciis ankaŭ la hispana duolingo kiu ĝis la jarfino atingis pli ol 11.000 kursanojn, ankaŭ senprecedenca nombro. Pasintjare al Duolingo aliĝis nova grava retejo, kiu gramatikmaniere instruas tre bazan Esperanton (je 12 lecionoj) jam en 14 lingvoj (learn.esperanto.com), kiu nombro da lingvoj daŭre kreskas. Tio estas la plej simpla kaj rapida maniero atingi bazan lingvan konon per la reto ne nur por tiuj kiuj konas la anglan aŭ la hispanan, sed sian nacian lingvon. Ankaŭ la pionira reta kurso lernu.net en 2016 lanĉiĝis modernigita kaj pli bela. Tiuj retaj instruadoj rapidege kreskigas la nombron de Esperanto-uzantoj kiuj mem kreas daŭre novajn aplikojn en la reto kaj tre diversajn retajn servojn. Tiu evoluo prezentas apartan perspektivon por la estonto.
4. Kelkaj specialaj atingoj ligiĝas al senprecedenca aktivado de Halina Komar el Pollando. Pro ŝia iniciato en somero estis konstruitaj reklamtendoj kaj plurtagaj deĵoradoj en Junulara muzika aranĝo Woodstock en kiu partoprenis pli ol 100.000 gejunuloj el la mondo kaj povis informiĝi pri Esperanto. Ŝi iniciate la Polaj ministerioj pri eksterlandaj aferoj kaj pri kulturo sendos al ĉiuj siaj ambasadejoj en la mondo konkretan proponon aranĝi ĉiu en sia urbo manifestacion dediĉitan al Zamenhof invite de UNESCO.

Mi kredas ke 2016 estis floranta kaj fruktodona jaro por Esperanto.

Zlatko Tišljarić

SENDITAJ KONKLUDOJ DE NITRA KONFERENCO AL ĈIUJ LANDAJ PARLAMENTOJ EN EU



Prezidanto de Komitato de Eŭropaj Aferoj de la Nacia Konsilio de Slovakio Ľuboš Blaha, kiu estis membro de la Honora Komitato de la 101-a UK en Nitro, dissendis informon kaj konkludajn dokumentojn de la lingvopolitika konferenco de V4+ landoj pri la temo "Perspektivo de komunikado en EU", t. e. la "Nitran Deklaron" kaj dokumentojn pri 3 temoj de la konferenco, al siaj partneroj, prezidantoj de komitatoj de eŭropaj aferoj en naciaj parlamentoj en ĉiuj 27 EU Membro-ŝtatoj.

Ľuboš Blaha en sia informo akcentis, ke en EU maturiĝis la tempo por malfermi enkadre de la diskuto pri estonteco de EU/Eŭropo ankaŭ pri lingvaj problemoj kaj malfermi pri ili interregistaran konferencon. Li petis ilin pri iliaj opinioj kaj proponoj por kunlaboro kaj projektoj pri tiu ĉi politike tikla temaro, sed esenca kaj ŝlosila por estonteco de EU/Eŭropo.

Respondoj de prezidantoj de parlamentoj de EU membro-landoj indikos al ni, kiuj landoj politike subtenos lanĉon de tuteŭropa diskuto pri lingva politiko en EU kaj kies institucioj partoprenos en lingvo-politikaj projektoj kaj aranĝoj en la jaro 2017, kiuj estos daŭrigoj de la lingvo-politika konferenco en Nitro.

Jozef Reinart

NOVA AMPLEKSA ROMANO EN ESPERANTO EL SLOVENIO



Okaze de Zamenhoftago prifestita la 10-an de decembro en Maribor, kiun ĉeestis pli ol 30 slovenaj esperantistoj interalie estis prezentita nove aperinta romano »Doberdo« de Prežihov Voranc, unu el la plej gravaj slovenaj prozistoj. La romanon preskaŭ 400-paĝan esperantigis Vinko Ošlak kaj lektoris Jozef Horvath. Temas pri eposa romano pri

soldata vivo dum la unua mondmilito. Ekzistas opinioj ke ĝi staras samnivele kun la famaj tiutemaj romanoj de Remarque kaj Hemingway. Ĉiukaze monumenta verko, bele bindita kaj reprezenta. La libron prezentis kaj parolis pri ĝi kaj ĝia aŭtoro Vinko Ošlak.

La eldonon financis Fondaĵo Prežihova ustanova en naskiĝurbeto de la aŭtoro Ravne na Koroškem. Kuneldonis Esperanto-societo Maribor.

Zlatko Tišljar

ESPERANTO EN WIKIPEDIO

Wikipedio en Esperanto nun enhavas 236.000 artikolojn kaj troviĝas je 32-a loko laŭ la nombro de artikoloj inter 295 lingvoj en kiuj wikipedio havas artikolojn. Kompare kun mia denaska lingvo, la irlanda, kiu havas 39.000 artikolojn kaj estas en la 88-a pozicio. La malta estas ankaŭ oficiala lingvo de EU kaj havas nur 3200 artikolojn troviĝante sur la 190-a pozicio. Inter la 24 oficialaj EU-lingvoj, 13 havas pli da artikoloj kaj 11 havas malpli ol

Esperanto. Ne malbone por lingvo sen ŝtato.
https://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias

Seán Ó Riain

Aldono de la redaktoro: En WikiTrans (<http://epo.wikitrans.net/>) nun (fine de decembro 2016) troviĝas 4.822.365 artikoloj en Esperanto kaj tiusence ĝi estas la dua plej granda lingvo en la mondo. Tio signifas ke en Esperanto troviĝas ĉirkaŭ 50 milionoj da paĝoj kun fakaj tekstoj kaj sekve tekstoj el ĉiuj mondaj fakoj. Kvankam temas pri aŭtomata tradukilo, ĝi estas mirinde bona kaj ĝi mem korektas sin daŭre.

ESPERANTO-ASOCIO DE RUMANIO ANTAŬENIGAS SIAN UNIVERSITATAN PROFILON



Plialtigi sian profilon estis la motivo por Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR) organizi en kunlaboro kun la Universitato de Vest, Timiŝoaro, dutagan kolokvon en Esperanto kaj la rumana lingvo pri "Esperanto, ponto inter lingvoj kaj kulturoj". En parolado Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA, deklaris, ke la celo de

UEA estas prezenti proponojn por fortigi la ligojn inter la diversaj universitataj aktivecoj (kursaroj, prelegoj aŭ aliaj iniciatoj) kaj serĉi laborfortojn por realigi almenaŭ partojn de tiu agado. Li ne menciis la laboron antaŭe faritan sur tiuj terenoj. Germain Pirlot, kiu sekvas la evoluon de proksime, tamen opinias, ke tiu kolokvo havas tre pozitivajn punktojn. Kunlaborante kun universitataj medioj kaj uzante du laborlingvojn por ebligi partoprenon de ne-esperantistoj ebligas eliri el la ĝis nun tro fermitaj Esperanto-medioj.

En la estraro kaj komitato de EAR kun dek kvin membroj unu triono estas universitataj. La kolokvo (11-12 de nov.) altiris tridek partoprenantojn el Rumanio, Germanio, Hungario, Kroatio, Makedonio kaj Serbio. Kiom el ili estas universitataj estas ne-konate. La seminario aŭdis resumon pri la programo de UEA kaj ILEI pri la nuntempe okazanta Jaro de la Lernanto. Entute dek partoprenantoj faris dudekminutan prelegon en unu el la du lingvoj, kaj alilingva traduko estis distribuita.

Johan Derks

ĈU EKZISTAS DU MOVADOJ?



Ekde kiam mi lernis Esperanton, mi ofte partoprenas en la Movado. Mi multfoje iris al kongresoj kaj renkontiĝoj kie mi parolis kun aliaj esperantistoj. Mi ankaŭ multe uzas la interreton por skribi kaj legi kun aliaj esperantistoj. Mi ofte blogas kaj uzas Fejsbukon, Tviteron kaj Rediton.

Sed ŝajnas al mi ke ekzistas granda divido inter esperantistoj kiuj uzas la interreton kaj tiuj kiuj partoprenas renkontiĝojn. Fakte, apenaŭ iu apartenas al ambaŭ flankoj, interrete mi ne vidas kongresanojn kaj la interretantoj ne partoprenas kongresojn. Estas kvazaŭ du apartaj movadoj ekzistus en

apartaj mondoj.

Mi havas unu piedon en la fizika, tradicia, persona, “vera vivo” movado (kiel ajn oni volas nomi ĝin) kaj unu piedon en la interreta, moderna movado. Mi partoprenas multajn renkontiĝojn kiel UK, IJK, JES, SES, IJS ktp. Mi ankaŭ aktive blogas, uzas Fejsbukon, Tviteron kaj estas estrarano de la esperanta grupo en Redito. Sed ŝajnas ke mi estas unu el tre malmultaj kiuj agas tiamaniere. Mi renkontis preskaŭ nenium de Tvitero en vera vivo, kaj mi dubas ĉu la plimulto de Redito iam partoprenis renkontiĝon.

Se oni legas la ĉefajn esperantajn interretajn grupojn, oni vidas malmultajn informojn pri la tradicia movado. Ĝenerale en la anoncoj temas pri ŝercoj, bildoj, la persona vivo kaj “saluton mi estas komencanto” (ĉi tiu estas duono de la fejsbuka grupo). Malofte oni vidas informojn kaj diskutojn pri renkontiĝoj aŭ Esperanto-kulturo. Fakte multaj interretaj komencantoj ne scias ke esperanta kulturo ekzistas ĉar oni vidas nenion pri libroj, muziko aŭ renkontiĝoj.

Kaj dum renkontiĝoj oni malofte diskutas la interretan movadon ĉar homoj simple ne konas ĝin. Mi eĉ renkontis kelkajn homojn kiuj tute ne aŭdis pri Evildea. La aliaj ju-tubistoj kaj blogistoj ĝenerale estas nekonataj. Mi konas multajn esperantistojn kiuj tre aktivis en la tradicia movado sed tute ne aktivis interrete. La Esperanto-Asocio de Irlando apenaŭ ekzistas interrete kaj donas malmultajn informojn pri la monataj renkontiĝoj.

Mi konas homojn kiuj pepas ĉiutage esperante sed neniam legis libron. Homoj kiuj ofte skribas kaj komentas sed ne konas UEA-n. Homoj kiuj havas grandan intereson en Esperanto, sed preskaŭ neniam renkontis alian esperantiston. Homoj kiuj forte laboras por krei libron aŭ muzikon, sed apenaŭ iu spektas ĝin. Anstataŭ, kiam oni vizitas interretan grupon, la plej populara anonco ofte estas iu fuŝtradukita bildstrio aŭ fama televida serio kiu uzis Esperanton dum tri sekundoj.

La plej granda kaj grava ekzemplo de tio estas la Duolingo-kurso. Mi memoras kiel forte esperantistoj strebis por lanĉi tiun kurson. Mi memoras la antaŭaĵojn de esperantistoj kaj kiel ni diskutis kiel ĝi ŝanĝos la movadon. Certe venos granda ondo de novaj esperantoistoj, oni diris. Tiu revivigos la Movadon kaj plenigos klubojn, renkontiĝojn ktp. Oni diris ke la kurso estus la plej grava okazaĵo por Esperanto en multaj jaroj.

Sed kio okazis? La kurso certe estas granda sukceso, pli ol 600,000 homoj uzas ĝin. Sed ĝi havis preskaŭ nenan efikon al la tradicia movado. La membraro de UEA kaj TEJO apenaŭ ŝanĝiĝis kaj la nombro da partoprenantoj ĉe renkontiĝoj samnivele. Mi dubas ĉu kreskis vendoj de libroj, publikaĵoj aŭ albumoj. Kie estas la ondo de novuloj? Se nur 2% de la novaj lernantoj aliĝus al la Movado, tio duobligus la membraron de UEA. La plej granda IJK iam ajn estis en 1987 kiam pli ol 1,000 homoj ĉeestis. Sed kun 600,000 lernantoj, certe estus tre facile atingi pli altan nombron, ĉu ne? Sed IJK estis pli malgranda ĉi-jare kaj UEA fakte perdis membrojn dum 2016. La interreta movado kreskis sed la tradicia Movado ne ŝanĝiĝis. Ŝajnas ke la kresko de unu movado ne helpis la alian.

Sed kial? Eble la interretoj ne vere zorgas pri Esperanto, ĝi nur estas bagatela, iu intereseto. Multaj homoj en Duolingo ŝatas nur provi lingvon kaj poste provi alian lingvon. Eble multaj duolingvanoj nur provis Esperanton dum unu semajno kaj poste perdis intereson. Eble la tradiciaj esperantistoj estas tro maljunaj kaj nespertaj por uzi la interreton.

Do, kion fari? Mi mem provas konstrui ponton inter la du movadoj. Kiel estrarano de Redito-grupo, mi ofte aŝiŝas pri la tradicia movado. Mi provas fari grupon kiu ne nur havas vantaĵojn kaj negravaĵojn, sed ankaŭ informas homojn pri grava laboro kaj kulturo de nia Movado. Mi ankaŭ informas pri la interretaj grupoj miajn fizikajn geamikojn. Sed oni povas venigi ĉevalon al akvo, sed ne trinki ĝin. Mi povas anoncadi, skribi kaj informi sed mi ne sukcesos sole, se neniu legos aŭ zorgos. Se homoj nur volas stultaĵojn, nur stultaĵoj ekzistos.

Do, kion vi povas fari? Se vi estas interretano, aliĝu al UEA kaj via loka klubo. Tiel vi helpas la Movadon kaj informiĝas pri la kulturo. Subtenu esperantistojn kiuj kontribuas al nia kulturo. Partoprenu renkontiĝojn. Se vi spertas en la tradicia Movado, aliĝu al interretaj grupoj kaj plibonigu ilin. Ili nur pliboniĝos se ĉeestas homoj kiuj diskonigos bonan informon kaj altkvalitiaĵon. Se vi malŝatas grupojn kiuj nur enhavas “saluton mi estas komencanto”, skribu pli bonan anoncon kaj subtenu homojn tie. Ni nur povas kunigi la du movadojn per via helpo kaj subteno.

Robert Nielsen

HERZBERG AM HARZ KONFIRMAS SIAN ESPERANTO-STATUSON



Antaŭ 7 jaroj, la 15-an de decembro 2009) Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, organizis grandan feston okaze de la inaŭguro de la bela Zamenhof-monumento en Herzberg. Multaj jam vidis, fotis kaj filmis ĝin. Nepre ni denove devos danki al aktiva samideano, s-ro Ĉielismo el Ĉinio. Li zorgis pri la produktado de la monumento en Ĉinio.

Kaj nun la lasta sukceso. La 14-an de decembro la urba konsilantaro (jam la 3a politika instanco ĉi-rilate en Herzberg, post

kiam la urbo decidis porti la nomon; Esperanto-urbo) unuanime voĉdonis je favoro nomumi la placon, sur kiu estas la monumento, "Zamenhof-Placo". Per tio la Urbodomo kaj la surlokaj politikaj instancoj emfazas la gravecojn de Esperanto kaj la fondinto d-ro Zamenhof, ankaŭ por la plua elkonstruado de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo.

La festakto kaj aliaj kulturaktivecoj pro la nomdonado en la Zamenhof-jaro kune kun la urbo "Herzberg am Harz-la Esperanto-urbo" okazos akurate je la grava dato: 14.04.2017 en Herzberg.

Petro Zilvar kaj Zsafia Korody

NOVTIPA ZAMENHOF-FESTO EN MOSKVO



La nova publika MASI-aranĝo – Festo de libroj en diversaj lingvoj je la nomo de Ludoviko Zamenhof – sukcese pasis la 18an de decembro 2016 en la moskva kinejo “Kosmo”. Klaras, ke la Zamenhof-festo estas vaste celebrata en Esperantujo, kaj ĉiu esperantisto scias, ke ĝi estas ankaŭ la Tago de la Esperanta Libro, sed ekster la esperantista mondeto neniu havas tiujn scion. Mi ne scias pri la tuta Ruslando, sed en Moskvo dum la lasta duonjarcento neniam okazis iu evento honore al Zamenhof por la urbanoj. Sed ĉu povas ekzisti pli taŭga informa preteksto? Sed kiel allogi publikon al priesperantaj aranĝoj? Devus esti kroma allogaĵo... Ĉe tio konvenis la sperto de la Moskva Esperanto-Asocio (MEA MASI) popularigi Esperanton dum la amasaj Moskvaj Lingvaj Festivaloj.

La novan eventon ni nomis iom nekutime por la rusa orelo: “Festo de libroj en diversaj lingvoj”. Kial ne en fremdaj? Unue, ĉar Esperanto ne estas fremda lingvo. Due, lingvoj de multaj ruslandaj popoloj estas por ili malfremdaj, kvankam ofte nur malmulte sciataj. Kaj ni deziris disponigi la spacon de nia festo ne nur al fremdaj lingvoj, sed ankaŭ al la malfremdaj

kaj al Esperanto. La plena nomo de la evento estas “Festo de libroj en diversaj lingvoj je la nomo de Ludoviko Zamenhof”. Ĉar ĝuste Zamenhof iniciatis la neŭtralan lingvon, al kiu estas tradukata literaturo klasika kaj nuntempa. Do, la Esperanta literaturo prezentas al la leganto literaturon, originale verkitan en diversaj lingvoj. Tial la festo de libroj en diversaj lingvoj havas firman bazon por porti la nomon Zamenhof, des pli, ke ni okazigas ĝin en la Zamenhof-Tago kaj en la esperantista Tago de la Libro.

Ĉi tiun klarigon ricevis ĉiuj invititoj, ankaŭ tiuj, kiuj eble neniam aŭdis la vortojn “Zamenhof” kaj “Esperanto”. Ne gravas, ke, probable, ili venis ne por ekscii pri Esperanto, sed ĉar ili interesiĝas pri libroj en iuj lingvoj. Veninte, ili neeviteble aŭdas klarigojn, vidas afiŝojn pri la Zamenhof-Tago kaj sub la verda standardo la plej libroriĉan tablon kun Esperanta literaturo; ili ankaŭ aŭdas Esperantan paroladon, ĉar duono el la ĉeestantoj estas esperantistoj. Ĉiuj povas tuj lerni legadon en Esperanto, aŭskulti rakontojn pri Esperantaj literaturaĵoj en la “Rondo de legado”, gajni esperantlingvan libron en kvizoj kaj partopreni etan Esperantan teatraĵon; ili vidas amikemon de la Esperanto-mondo al la mondoj de alilingvaj literaturoj kaj reciprokan amikemon de aliaj literaturoj al Esperanto. Fine kelkaj diras: Esperanto ekinteresis min, mi eĉ ekdeziris ĝin lerni.

Jen la esenco. Restas raporti pri kelkaj konkretaĵoj. La festo daŭris ses horojn. En la vasta salono samtempe laboris kelkaj teritorioj kun siaj programoj. Sur la “Podio” seninterrompe po 30 minutoj okazis prelegoj (du el ili – pri la evoluo de la Zamenhofa idearo kaj pri la Esperanta biblioteko – estis prezentitaj de la Esperanto-akademiano Nikolao Gudskov), kvizoj kaj deklamadoj en diversaj lingvoj. Ĉe la tablo “Rondo de legado” ĉiun kvaronhoron ŝanĝiĝis rakontantoj pri libroj, legitaj en diversaj lingvoj. Konstante laboris temaj libraj tabloj: “Tablo pri Esperanto”, “Tablo pri libroj en la slavaj lingvoj”, “Tablo pri tekstoj en sanskrito”, “Tablo pri libroj en la maria lingvo”, “Tablo pri tradukarto”, “Tablo pri rapida instruado de legado por infanoj kaj plenkreskuloj”, “Tablo kun ekspozicio de libroj en diversaj lingvoj”.



La feston partoprenis ĉ. 50 homoj, preskaŭ ĉiuj venis de la Moskvaj Lingvaj Festivaloj. Ĝin organizis tri MASianoj (mi dankas al Sofja Zareckaja kaj Maksim Silantjev), la programojn gvidis ok homojn. La etoso estis malstreĉa kaj hejmeca, por ĉiu programero sufiĉis gastoj, ĉiuj gvidantoj sukcesis realigi ĉion planitan kaj esprimis firman deziron partopreni samtipan eventon en la sekva jaro. Ankaŭ la publiko aspektis interesita kaj kontenta. Do, estas ĉiuj premisoj, ke la

festi transformiĝu al festivalo kun pli varia programo, pli da partoprenantoj kaj gastoj. Lige kun tio ni havas multe da interesaj ideoj – sed pri tiuj vi legos en sekvaj artikoloj.

Irina Gonĉarova (El La Balta Ondo)

ĈU ITALA ESPERANTO-KONGRESO AŬ MEDITERANEA KONGRESO?

Malfacilas diri. Ni provas per la kongresa temo "Kulturo kaj komunikado en Eŭropo" devigi Eŭropon trovi siajn mediteraneajn radikojn, kiujn ĝi verŝajne forgesis. La kongreso okazos en unu el la centroj de la greka kulturo en la antikva tempo. Sed krom tio okazos programeroj specife dediĉitaj al kunlaboro inter esperantistoj ĉirkaŭ la Meza Maro, se ni volas uzi la nomon laŭ kelkaj grandaj lingvoj de ĉi tiu regiono.

Se vi loĝas en marborda lando de ĉi tiu maro, bonvolu proponi prelegojn kaj programerojn pri via lando kaj pri la kunlaboro inter esperantistoj de ĉi tiu regiono. Skribu al kongreso@esperanto.it kaj proponu.

Kompreneble vi ankaŭ rajtas partopreni kaj ne prelegi sed ĝui prelegojn, muzikajn programerojn en Esperanto kaj ekskursojn. Rigardu la paĝon <http://kongreso.esperanto.it/84/bonvenon.htm> kaj aliĝu. Vi estos hejme. Bonvenon hejmen!
LKK

OLIMPIKOJ KAJ ESPERANTO

En Eŭropa Bulteno (Novembro 2016) estis publikigita el Irana Esperantisto artikolo de Amir Fekri „LINGVA PROBLEMO EN OLIMPIKOJ“. En ĝi la aŭtoro demandas: „Kial ni ne lanĉus kampanjon por uzi kaj apliki Esperanton en la olimpiko 2020?“ Por multnacia partoprenantaro, ĉu sportistoj, ĉu organizantoj kaj ceteraj vizitantoj Esperanto ebligis pli libere interbabili kaj iliaj solaj vortoj ne estus nur „saluton“ kaj „kiel vi fartas“, kiel diras aŭtoro en la artikolo. Por uzo de Esperanto en olimpiko estas komprenebla premiso, ke necesas havi kiom eble kompletan sportan terminologion. Al la terminologia problemo mi trovis du menciojn. La unua estas el la Socikultura bulteno de Fokolar-movado, aŭtuno 2016: »En la sama somero (1976), kanada urbo Montreal gastigis la 21-an Olimpikon kun partopreno de 6,000 sportistoj el 92 landoj.

Por tiu evento, esperantistoj el provinco Quebec (Kebekio) aranĝis kampanjon kiu montriĝis kiel unu el la plej sukcesaj en la postmilita E-movado. Ili atingis financan subtenon de la provinca registaro kaj konsenton de la organiza komitato por eldoni kelklingvan „Olimpikan terminaron“. Ĝi aspektas tre bele, kun profesiaj grafikaĵoj kaj paralela traduko por ĉiu sporta disciplino. Estis tie kvar kolonoj: por Esperanto, franca kaj angla lingvoj. Tre bone utilis la kolono kvara – malplena por ke ĉiu sportisto aŭ turisto povu aldoni respektive la vortojn en sia gepatra lingvo. Eldonkvanto de „Saluton amiko“ estis tre alta (proksimume 10 mil ekzempleroj) kaj ĉiu partoprenanto de la Olimpikoj ĝin senpage ricevis. Komence troviĝis konciza informo pri Esperanto, tiel la presaĵo estis ege sukcesa reklamo de la Internacia Lingvo. Okaze de tiu evento, unu el stratoj apud la riverego de s-ta Lorenzo en Montrealo estis nomita „Avenue Pierre De Coubertin“.

La dua estas el libro de Jan Werner: Tvorba slov v esperantu – Vortfarado en Esperanto, p. 99: »Diskuton pri la nomo „*kurlingo*“ partoprenis ankaŭ s-ino Olga el Kanado. Ŝian kontribuon, kiun mi publikigis en *Konstru-Forumo* n-ro 31 el novembro 2011, mi ĉi tie enmetos almenaŭ mallongigite, ĉar la esencon de iluzio pri la „pura lingvo“ ĝi perfekte findesegnas:

Antaŭ certa tempo okazis tragikkomika eksperimento de konservativaj esperantistoj en Calgary, kiuj prilaboris „lingve puran“ sportan terminologion, enhavantan ĉiujn terminojn bezonatajn dum olimpikaj ludoj en Calgary en la jaro 1988. Ĉiuj partoprenantoj de la ludoj ricevis po unu ekzemplero... Por ĉiu, kiu volus ridindigi ideon de Esperanto kiel internacia lingvo, la bela kaj belaspekta broŝuro por la celo estus konvena materialo. Ankaŭ por ni, ĉiutagaj uzantoj de Esperanto, estis ĝislitere rebuso, kiu sporto estas kaŝita post tiu aŭ alia kungluaĵo de kelkaj radikoj.

Do, eblas konstati, ke ne necesas en la afero komenci de nulo, ĉar la terminaro jam estis preparita, sed (kiel montras agado de esperantistoj el Calgary) estas necese dediĉi gravan atenton al sporta terminologio. Estas do demando, ĉu la vortaroj estis la samaj aŭ similaj, aŭ ĉu estis preparitaj sendepende unu de la alia.«

Josef Vojáček.

KAMPANJO „ZAMENHOF KAJ LABORLINGVOJ EN EU“



Mi memorigas la legantojn ke EEU lanĉis la kampanon kaj ni invitas ĉiujn landajn asociojn, membrojn de EEU, dum la sekva jaro organizi laŭeble multajn publikajn eventojn dediĉitajn al Zamenhof kiel monde grava personeco kaj liaj konceptoj kaj al eŭropa lingva praktiko rilate laborlingvojn en internaciaj kunvenoj.

Nia bulteno aperigos ĉiun kvaronjaron kiom da tiaj aranĝoj okazis en unuopaj landoj kaj fermos la kamanjon la 20-an de decembro 2017 kiam ni proklamos la venkinton. La kampanjo celas eluzi la du faktojn interesajn

por neesperantistoj (UNESCO proklamon kaj Briteliron) por disvastigi laŭeble multe la konscion pri ekzisto de Esperanto kaj ĝiaj potencialoj en lingva situacio en Eŭropa Unio.

Tio signifas ke ĉiu landa asocio devus inviti siajn societojn, klubojn kaj ankaŭ individuojn organizi en siaj urboj aranĝon publikan pri la supra temo. Ni ne kalkulas aranĝojn pure por esperantistoj en kiuj nur Esperanto estas uzata. Ni rekomendas organizi ilin kun iu ŝtata aŭ neregistara organizo kiel kun Eŭropaj kluboj, UNESCO-kluboj, Urbaj Gvidantaroj sed antaŭ ĉio kun ministerioj de eŭropaj aferoj, UNESCO-Komisionoj, reprezentetoj de Eŭropa Komisiono kaj tiel plu. Post ĉiu aranĝo la Landa Asocio raportu mallonge al la sekretario de EEU pri ĝi kaj pri tio aperos informo en la marta, junia, septembra kaj decembra EEU-Bulteno. Fine de la jaro ni nombros la rezultojn kaj proklamos la venkintan Landan Ascion. La kampanjo ne nur servos al diskonigo de Esperanto, sed akaŭ por analizi post ĝi diversajn spertojn gravajn por nia estonta laboro: kiel volonte aŭ malvolonte aliaj institucioj kunlaboras kun ni, kiamaniere reagas la publiko, kiom tiuj aranĝoj helpis por ke pligrandiĝu kvanto da E-lernantoj en retaj kursoj, kiujn la kampanjo reklamu ktp.

Zlatko Tišljarić

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de decembro 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Jozef Reinbart, Seán Ó Riain, Johan Derks, Robert Nielsen, Petro Zilvar, Zsófia Korody, Irina Gončarova, Jozef Vojáček

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

